# Trovu vian paron! – pariga ludo

| | |
|---|---|
| **Celo:** | Alkutimiĝo al senĝena moviĝo, elparolo de nekonataj vortoj, forigi (malpliigi) la komencan streĉon. |
| **Celgrupo:** | Tutkomencantoj. |
| **Antaŭpreparo:** | Almenaŭ 6 kartoj. Sur la duono de la kartoj estu gluitaj (fotitaj, bone rekoneblaj, ekzemple el vendeja katalogo) bildoj de diversaj ĉiutagaj objektoj, prefere tiuj, kies nomoj estas internaciaj: biciklo, televido, radioaparato, faksilo, ktp. sed estu maksimume 1 – 2 – 3 kun nomo ne facile rekonebla (polvosuĉilo, tondilo). La ludantoj lernis ankoraŭ preskaŭ neniun vorton el tiuj. Sur la alia duono estu la nomoj bele skribitaj. |
| **Tempo:** | 5 minutoj (plus anticipa klarigo) |
| **Ludantoj:** | minimume 4 |

Ĉiuj elektas po unu el la bildkartoj. Kaj poste (forlasante siajn lokojn) klopodas trovi la paron (bildo kaj signifo). Ili prefere ne montradu la bildojn, sed tiuj, kiuj havas la tekstan karton „voku” la paron, elparolante laŭte(!) la vortojn. Trovante la parojn, ili kune sidas kaj faros la sekvan taskon. Estas celo ke la ludantoj kiel eble plej rapide trovu siajn parojn kaj tiel povu ekkomenci la sekvan taskon.

